

Ŝtorman maron

Bonvolu aŭskulti la kanton <http://edukado.net/ext/ilodok?d=1581> (kun _ inter Ŝtorman kaj maron) kaj respondi al la demandoj. Sur la paĝo nr.2 vi trovas ankaŭ la kantotekston. .


Kiu aserto veras?

Aŭskultinte la kanton (laŭeble sen legi la tekston) decidu, ĉu la subaj asertoj estas veraj aŭ ne. Se vi povas argumenti por via respondo per iu koncerna linio aŭ frazo de la kantoteksto, bv. skribi tiun apud la aserton.

- 1) La kanto estas amkanto. -----
- 2) La kantisto estas trista. -----
- 3) Estas bona vetero. -----
- 4) Estas pluvo kun forta vento. -----
- 5) La kantisto flugas hejmen. -----
- 6) La kantisto estas en malgranda boato. -----
- 7) Li luktas kontraŭ la vetero. -----
- 8) Li volas iri hejmen kun la amatino. -----
- 9) Li volas esti hejme kun la amatino. -----
- 10) Li volas esti libera. -----
- 11) La amatino loĝas trans la maro. -----
- 12) La kantisto volas flugi kiel marbirdo. -----
- 13) Li remas en la ĉielo. -----
- 14) Li sopiras esti kisata de la amatino. -----
- 15) La kantisto mortas. -----
- 16) La kantisto suferas pro mallibereco. -----
- 17) Al la kantisto mankas la amatino. -----
- 18) La kantisto mankas al la amatino. -----
- 19) Li forgesis la amatinon. -----
- 20) Li timas, ke la amatino ne pensas pri li. -----

Ŝtorman maron

Ŝtorman maron
Ŝtorman maron
Etboate strebas mi
Superpasi, hejmeniri
Liberiĝi, kuni vin.



Kiel mevo
Kiel mevo
Trans ĉielon flugas mi
Inter nuboj kaj ĉielo
Pri viaj kisoj revas mi.

Mi mortadas
Mi mortadas
Sen libero kaj sen vi.
Foran maron, vian paron
Ĉu forgesos ankaŭ vi?